

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1974

7 (45)

KULTURA PALETO EN MĚLNÍK

POST UNUJARA PAŬZO

Per la supra slogano faris adiaŭon ĉe la fino la ĉeforganizanto de la ĉijara VII-a esperantista renkontiĝo en la urbo de vino Josef V í t e k, la prezidanto de ĈEA kaj lia slovaka kolego - programa kungvidanto E.V.Tvarožek. Krom ĈEA kaj AE SSR, kies prezidanto Pavel R o s a ankaŭ partoprenis, aŭspiciis la aranĝon Distrikta Packonsilantaro kaj Distrikta Nacia Komitato. Por Nacia Fronto ĉeestis k-do Douděra.

Ekstreme abunda vizitanto okulfrapis : pli ol 300 personoj el ĉeĥaj kaj slovakaj urboj kaj pli ol 50 geesperantistoj el GDR, Hungario kaj Aŭstrio. Relative malfavora vetero ne sukcesis malkuraĝigi la gastojn ekskursi sabate al la monto Říp...

Dimanĉa laborkunveno de la junularo estis certe evento : la junaj esperantistaj funkciuloj lerte raportis pri siaj aktivecoj kaj pri sia preteco stimuli la programon de la internaciisma edukado per Esperanto en la formo de la t.n. Interkluboj, kiel oni jam bone pruvis en Aŝ. La kunsidon sub la gvido de J.Vítek j. vizitis ĉ. 50 reprezentantoj de 20-25 junularaj grupoj. Oni bonvenigis inter si ankaŭ la asocian sekretarion Z.Křimský, kiu eksplikis la celojn de ĈEA kaj de ties junulara komisiono.

Internacia kultura programo - dimanĉan posttagmeze en la Kulturdomo de kpt.Jaroš - havis sian pezocentron en la kant- kaj dek-lamprezentadoj de M.Smyčka, solisto de la operejo en Ústí n.L kaj de E.Seemannová, praga aktorino /en la tradukoj de J.Kořínek, R.Hromada kaj T.Pumpr; krome estis deklamita poemo de E.Urbanová Antaŭ spegulo/. La kantiston akompanis je fortepiano d-ro V.Novobilský.

La unuan datrevenon de la Packongreso en Moskvo rememorigis kaj soci-utilan esperantistan laboron emfazis prez.de la ĉeĥa MEM-sekcio kaj membro de Ĉeĥa Packonsilantaro O.Kníchal.

Distrajn erojn preparis L.Rýznar, sorĉisto, aperigante aŭ malaperigante diversajn objektojn ; gitarludantinoj O.Velická kaj J.Hrdličková, plue J.Havelka kun P.Skála, ĉiuj el Mělník, kaj la fratoj Schick el Aŭstrio per sia malmola leciono pri karateo. Ensemble de la Kulturdomo interludis per popolstilaj dancoj kaj kantoj. Kaj fine - la Kvarteto Esperanto kun sia afergvidanto E. V. Tvarožek sonigis kelkajn slovakajn popolkantojn en moderna aranĝo.

Al ĉiuj organizintoj apartenas ĉies danko ne nur pro la akurata marŝo de la programo, sed ankaŭ pro la prizorgo ĝenerala. /kni/

Plzeň ekspoziciis

En Plzeň okazis inter 21.-28.9. 1974 la ekspozicio "Per Esperanto por la mondopaco" omaĝe al la 70a datreveno de la EK, 30jara jubileo de Slovaka Nacia Revolucio k liberigo de ĈSSR far la Soveta armeo.

La organizintoj atentigis precipe pri la agado de MEM, ekspoziciante diversajn dokumentojn. a. pri ties fondinto R. Burda, kiu vivis en Plzeň, kaj pri la lastjara Tutmonda Packongreso. La ekspozicio, vizitita de 170 personoj, sekvigis pluan intereson pri E-o kaj por la Esperanto-kurso aliĝis 14 gejunuloj. Pri la aranĝo informis ankaŭ la regiona gazeto Pravda.

EK subskribis ĉi-okaze amikecan kontrakton kun la esperantistoj el Gera, GDR, vizitintaj la ekspozicion.

La rondeto en Plzeň intencas okazigi venontjare en majo renkontiĝon - denove kun ekspozicio pri E-o. /k/

SINDIKATOJ KAJ E-O

Niaj sindikataj funkciuloj veturas eksterlanden por kiel eble plej multe informi pri la spertoj de la hungaraj sindikatoj, sed la lingva izoliteco estas grava malhelpo en la reciprokaj rilatoj, konstatas i.a. en la intervjuo por la gazeto "Esperanto Magazin" /sept. 1974/ la ĝenerala sekretario de la hungaraj sindikatoj Sándor G á s p á r.

Solvo de la lingva problemo tuŝas interesojn de la tuta sindikata movado, ĉar tiu ĉi havas komunan celon. Mia opinio la internacia lingvo Esperanto, diris S. Gáspár, povus ludi eminentan rolon interkonigante la diverslingvan laboristaron. La hungaraj sindikatoj proponus en la konvena momento, ke la internacia sindikata forumo subtenu Esperanton, ĉar ĝi povas faciligi personajn kontaktojn de la labor-

uloj. Internacia amikeco kaj la internaciismo povus tiamaniere iĝi persona sperto por ĉiuj laboristoj.

Kian konkludon oni povas fari?

Unue, ke ĝuste en la plej amasaj organizaĵoj, nome la laboristaj, la lingva problemo estas forte sentata kaj solvenda. Due, ke Esperanto sola proponas la solvon.

Kaj krome, ke Esperanto akceptiĝos unue en diversaj organizaĵoj sur landa aŭ faka niveloj kaj nur poste povas estiĝi premisoj por ties ĝenerala akceptigo. /k/

TRIDEK RONDETANOJ el VŽKG ekskursis la 18an de sept. al Dresdeno, GDR. Amike bonvenigis ilin tie ne nur la esperantistoj, gedzoj Berndt, Evelin kaj Seidemann, sed ankaŭ unua sekretario de la Kulturligo en Dresdeno W. Michalek, kiu donacis al la gastoj bildlibron pri la urbo. Akompanate de 11 dresdenaj amikoj oni ĝuis la lokajn memorindaĵojn kaj ligis bonajn personajn kontaktojn, de kiuj oni volas profiti por la venonta ĝemeliĝo. /dk/

EKSKURSOJ KAJ ALIAJ PREMIOJ atendas la eksterlandajn aŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj respondos je tiuj ĉi demandoj:

1/ Menciuj konatajn al vi atingiĝojn de polaj sportistoj /sporttrancojn, nomojn, rezultojn ktp./

2/ Kiujn polajn sportajn atingojn vi opinias la plej gravaj kaj kial?

La respondojn oni sendu al Polskie Radio, 00-950 Warszawa P.O.Box 46 ĝis la 31.12., kun signo KONKURSO.

Rekono de ĈPK

Dum la plenkunsido de Ĉeĥa Pac-konsilantaro /ĈPK/ 17.9. en Prago estis elektita kiel membro de tiu ĉi supera organo de la pacmovado en ĈSR Oldřich K n í ch a l, prezidanto de la ĉeĥa MEM-sekcio kaj membro de Internacia Komitato de M E M.

EK DO ROKU 1975

Mělnický kroužek trvale spolupracuje s Okresní mírovou radou, v níž má svého zástupce M. Lochmanna, který pravidelně podává zprávy na zasedáních OMR. Také vedoucí činitelé OMR se účastní vrcholných akcí EK, např. předsedkyně OMR se zúčastnila našich tradičních setkání a nad 7. setkáním převzaly záštitu OMR spolu s MěNV.

Delší dobu usilujeme o vydání prospektu o svém městě v esperantu, k 30. výročí osvobození ČSSR. To však bude záviset na finančním výsledku letošního setkání, jehož rozpočet jsme předložili MěNV/téměř 10 000 Kčs./

Kroužek se schází podle čtvrtletních plánů, jednou za 14 dní, v úterý od 16,30 do 18 hod. V rámci schůzek, které mají hlavně osvětový charakter, přednášejí členové o svých cestách, zkušenostech apod., esperantsky nebo česky. Kromě hlavního programu je jazyková čtvrthodinka, dotazy, odpovědi aj. Mladí členové mají podle svých zájmů vlastní schůzky při kytáře nebo s vycházkami. Vedoucím těchto schůzek je J. Votrubec.

O jarních prázdninách uskutečníme s největší pravděpodobností tradiční návštěvu u drážďanských esperantistů, a obdobně závěrem školního roku plánujeme několikadenní návštěvu MLR, zejména Budapešti a Várpalaty, jejíž gymnasium nám hodlá zapůjčit na několik dní chatu u Balatonu - za to, že jsme hostili dva členy tamního EK 14 dní v Lančově.

Jako letos a v minulých letech, také v příštím roce hodláme silně a včas propagačně působit na členy kroužku, aby se jazykově zdokonalovali v LET v Lančově. Tato naše každoroční snaha se nám daří, mělnický kroužek má bezesporu řadu let nejvyšší účast v LET. Naši mladí lidé tam vystupují ukázněně a navštěvují hlavně vyšší kursy, což dokazuje jejich snahu o zvýšení jazykových znalostí. Škoda jen, že jejich účast ve schůzích EK je minimální, protože mají jiné zájmy a musí využít času také ke svým studijním povinnostem.

Dovolí-li to okolnosti, chceme opět v říjnu uskutečnit již VIII. setkání, protože jsme přesvědčeni, že esperantisté ČSSR mělnická setkání rádi navštěvují a jejich náplň jim vyhovuje.

V prosinci chceme uskutečnit schůzku Den esperantské knihy s projevem o životě tvůrce esperanta, jehož hrob jsme letos opět navštívili.

Plán mělnického kroužku je připravován v úzké koordinaci s EK Domu pionýrů a mládeže v Roudnici n.L., s tím rozdílem, že tam se konají schůzky každý pátek od 14 hod. s náplní hlavně vyučovací /podle učebnice T. Kiliana/. Starší členové kroužku letos absolvovali v Lančově B kurs a získali diplom.

Oba kroužky vydávají podle potřeby společný oběžník.

Josef Vítek, ved. kroužků

Na počest SNP

30. výročí Slovenského národního povstání oslavili ústečtí esperantisté 20. září kulturním večerem v hudebním sále ODKP. O historii a významu SNP jako průbojníka nového společenského řádu a o vedoucí úloze KSČ v tomto boji promluvil Jiří Kořínek. Proslov uzavřel vlastním esperantským překladem básně P. Horova "Slovenská panoráma".

V další části pořadu zazpívali několik písní a arií členové Státní opery Zd. Nejedlého v Ústí n.L., M. Smyčka, D. Sluková a J. Šolceová. Na klavír doprovázel J. Wolf. Arie a dvojzpěv v esperantském překladu J. Kořínků a T. Pumpra, a v dokonalém a procítěném uměleckém přednesu, sklidily opětovaný potlesk přítomných, mezi nimiž byli hosté z Prahy, Teplic, Mostu, Kolína, Lovosic, Klášterce n.O. i třicetičlenná výprava esperantistů z Ostravy.

/jk/

J.VONDROUŠEK 70jara

La 1-an de dec.70jariĝos Josef V o n d r o u š e k, esperantisto ekde 1923, komitatano de ĈEA, honora prezidanto de EK Brno, portanto de la Honorinsigno de MEM, iama komitatano de EA ĈSR kaj ano de la redakcia rondo de Zprávy ĈSEV.

J.Vondroušek preskaŭ 30 jarojn gvidis la esperantistan agadon en la moravia ĉefurbo, organizinte tie ankaŭ tri landajn kongresojn/laste la konstituan kongreson de ĈEA en 1969/. Atentinda estas lia informa laboro por la loka gazetaro. J.Vondroušek konatiĝis aparte kiel tradukisto : antaŭ kelkaj jaroj estis eldonita Libro de Apokrifoj de K.Čapek, antaŭ la milito la libreto Moravia Karsto/en E-o/. Iuj liaj tradukoj restas dume en manuskripto.

Ankaŭ per sia eksterordinara modesteco la jubileanto meritas estimon kaj ŝaton de ĉiuj siaj kontakto-samideanoj. /k/

La 2an de dec.ĝisvivas sian 75an jaron inĝ. Eduard F e l i x, esperantisto ekde 1959, sekr.de Lingva komisiono de ĈEA, ano de la redakcia komitato de Starto, al kiu li ofte kaj fruktodone kontribuas. Dum pluraj jaroj E.Felix instruadis en SET Lančov, kunlaboris al PACO kaj publikigis kelke da siaj tradukoj el la samtempa ĉeĥa poezio kaj prozo en Esperanto, Norda Prismo kaj alie. /k/

Forpasis en Hradec Králové la 14. 9. Milada V y b u l k o v á, aĝa 88 j., senlaca, entuziasma EK-anino.

Mortis en Karlovy Vary la 24an de julio Václav R i e d l.

Stanislav M a r t i n o v s k ý esperantisto ekde 1929, forpasis en Ĉ.Budějovice la 18an de sept., aĝa 77j. Ĉe funebra ceremonio adiaulis lin la klubestro O.Hrubý.

Honoron al ilia memoro !

Kun malfruiĝo akceptu niajn bondezirojn s-ro Jan Mikš Ch a n o v s k ý el Prago, kiu la 23an de junio atingis sian 80an jaron.

SALUTOJN EL LA I-a LUZACIA RENKONTIĜO en Zgorzelec /septembro 1974/ sendis al ĈEA partoprenintoj el Pollando, GDR kaj ĈSSR.

PASIS 62 JAROJ ...

"/Oni/ĉiam pravas bezonon de la lingvo internacia kaj ĉiam tiel klare, ke la ĉeestantaro brue aplaudas kaj neniu kontraŭstaras, ĉar ĉiuj estas esperantistoj. La neesperantista publiko neniam venas enaĉi tiujn kunvenojn, kaj estas bone, ke ĝi ne venas, ... Nativaj diletantoj kantas kaj deklamas... Kaj poste oni iras hejmen. Oni estis en entuziasmo pro nekonsolata kaŭzo, oni nenion faris por propagando aŭ organizado de nia laboro... Sed ĉu povas utilia entuziasmo, tute elementara, tute sencia, bazita en fantazio, kiu faras fantazion kunlaboranto en raciisma movado ? ... Neniu scias, neniu kredas en si mem, ..neniu atendas ion de si por la movado, sed ĉiu atendas, ke ĉion por la movado donos la eksteraj elementoj, registaroj... Do, kion fari ? Malesperi ? Tute ne. La ideo de Lingvo internacia estas tiel vivopova, ke eĉ ĉiuj malsagaĵoj de ĝiaj partianoj ne pereigis ĝin"

S.Kamaryt en "Ĉeský Esperantista" 1912

Internacia laborbrigado

En la Kulturdomo de VŽKG en Ostrava jam 22 jarojn laboras Esp. rondeto. Ĉijare, laŭ la invito de BEA ĝi sendis du esp.gejunulojn, J.Hinčica kaj L.Štěpaníková, al senpaga laborbrigado, kiun fine de aŭgusto organizis en Kaliakra la Bulgara arkeologia societo.

Ambaŭ ostravanoj bone reprezentis sian landon kaj urbon inter la ceteraj 95 senditoj el Pollando, Hungario, Jugoslavio, Rumanio, Britio kaj Sudano. Dank' al la facila interkomprenilo la kontaktoj kaj diskutoj okazis sen ĝeno. Al la gejunuloj prelegis N. Aleksiev, prez.de MEM pri la aplikado de E-o en la pacmovado. Estiĝis amikaj rilatoj - J.Hinčica invitis sian amikon el Sudano por vizito al Ostrava. D.Kočvara

VALORAĴ ATINGOĴ - ankaŭ per p. m.

De tempo al tempo aŭdiĝas plendoj, ke la esperantistoj ofte uzas la IL nur por siaj filatelaj kaj similaj celoj, dum oni bezonas praktike kaj efike propagandi ĝin. Vortoj eble bone intencitaj, tamen maljustaj. Jen kelkaj faktoj :

1. Ĉe la Asocio de ĉeĥaj filatelistoj laboras ankaŭ Esperanta sekcio. Pri ĝiaj laboroj, "Informilo" ks. legas dekmiloj da filatelistoj en la ĉeĥlingva revuo "Filatelie".
2. Membroj de la sekcio ekspozicias siajn kolektojn pri la IL, kiuj estas premiataj per medaloj. La oficialaj institucioj tion notas kaj pretas uzi E-on sur poŝtaj dokumentoj. Okaze de la tutŝtata ekspozicio de p. m., Brno 1974, ĉs. poŝto eldonis unu koverton kun la teksto en kvar lingvoj kaj du kovertojn kun Esp. teksto !
3. Okaze de la Internacia ekspozicio Opava 74 oni ekspoziciis 5 Esp. kolektojn. Kaj la rezulto? Kvin kolektoj - kvin medaloj plus tri honorpremioj, publika interesiĝo pri E-o. La ekspozicio uzis specialan stampon kun priesperanta teksto.

Ĉu ne paradokse, ke la filatelistoj-neesperantistoj gratulis nin pro la bona filatela laboro, dum iuj esperantistoj konsideras nin strangaj amasigantoj de koloraj paperetoj? Pri taŭgeco de Esperanto ne konvinkas flamaj vortoj aŭ vagonoj da flugfolioj, sed ekzemple simpla poŝtkarto, pruvanta, ke ankaŭ hodiaŭ oni oficiale uzas kaj rekonas Esperanton. /va/

Rim. de red.: Sur ĉiu agadkampo oni kompreneble distingu inter seriozaj istoj kaj stranguloj, inter celkonscia laboro kaj nura hobiemo.

FILATELISTOJ DENOVE SUKCESIS

En la Regiona ekspozicio de poŝtmarkoj "Neratovice 74" /8.-20.9./, inaŭgurita de ĉs. ministro de telekomunikoj V. Chalupa, oni povis vidi ankaŭ kolekton "Esperanto en praktiko" de V. Vána el Plzeň, kiu gajnis arĝentumitan medalon.

La kolekto "Historio kaj nuntempo de Esperanto" de D. Bartošík gajnis grandan arĝentan medalon plus honorpremion de la ekspozicia jurio en la Internacia ekspozicio de poŝtmarkoj "Stockholmia 74" /21.-29.9./ Federacio de ĉs. filatelistoj elektis tiun ĉi kolekton por la Tutmonda ekspozicio de p. m. "Espana 75", kiu okazos en majo 1975 en Madrid. /espo/

Skribas veterano el GDR

Kiel juna esperantisto, gvidanto de la Esp. sekcio en Laborista Junularo kaj vicprezidanto de GLEA, mi forlasis 30.9.1923 mian naskiĝurbon Chemnitz /hodiaŭ Karl-Marx-Stadt/ kaj ĉar miaj geavoj devenis el Pláná apud Mariánské lázně /okc. Bohemio/ mi devis veturi al la najbara ĈSR por soldatservi tie en Lučenec /suda Slovakio/. Tie mi, kun helpo de la esperantistoj-kamaradoj, povis fondi la Esperantan Soldatan Rondon - en la Granda kazerno ! En Lučenec ekzistis tiam la Hungara Esperanto-Societo, kiu tre vigle aktivis. Dum Pasko 1924 mi ricevis la unuan forpermeson por partopreni la 5an GLEA-kongreson en Chemnitz. En Prago mi interrompis la vojaĝon por viziti la tiean Esp. Servon.

En oktobro 1924 la HES en Lučenec aranĝis en la YMCA-kulturdomo Esp. ekspozicion, kiu ebligis sukcesan Esp. kurson por hungaroj kaj la alian por germanlingvanoj... Dum la kristnasko mi trovis tie mian soldatan fianĉinon, esperantistinon. Nia edziĝo okazis en aprilo 1926 en Osek. Nia estonto atendis nin en Ŭlsnitz, sed niaj kontaktoj kun Lučenec finiĝis en 1938 pro la faŝista kontrolo, kiu detruis multajn Esperantaĵojn.

Rosner, Ŭlsnitz, GDR

Ni legis...

Josef Nesvadba : LA PERDITA VI-ZAĜO, eld.ĈEA,1974,112 pĝ.

Jen bonvene antaŭ mi kuŝas la unua libro el la planitaj eldonaĵoj por ĉi tiu jaro. La plaĉlibreto prezentas dek rakontojn el diversaj libroj de la populara verkisto. Parte temas pri scienc-fikciaj rakontoj kun absorbe streĉa temo. El ili al mi plej plaĉis La cerbo de Einstein, kies sprito rememorigas pri la verkoj de Karel Čapek kun siaj filozofiaj ĉefideoj.

Kvankam la libreto ne pretendas esti ia reprezenta ĉefverko de la moderna ĉeĥa literaturo, ĝi estas nepre interesa kaj atentinda legaĵo por ĉiu kaj valora riĉigo de la magra Esperanta eldonaĵ-listo. Rekomendinda ĝi estas des pli, ke la traduko estas vere bona, kun lingvo konforme kaj inventeme redonanta modernajn parolturnojn kaj abundajn fakesprimojn. Tio estas merito de la tradukinto Adolf Staňura kaj de la lingvaj reviziintoj, inĝ. Eduard Felix kaj Oldřich Kníchal. La 112 paĝojn de ĝuiga legaĵo kompletigas ilustraĵoj de Irena Šváčková. Valoron de la libro pliigas malmultaj preseraroj kaj malĝustaĵoj. Jiří Kořínek

Bruno Apitz : NUDA INTER LUPOJ, eld. Verlag für Kunst und Wissenschaft, Leipzig 1974, 477 pĝ.

Sur la fono de la nazia koncentrejo Buchenwald kaj sur tiu de la mondmilitaj okazaĵoj kulminantaj en liberigo, la aŭtoro redonas historion pri la savo de malgranda pola infano, aŭtentika persono re trovita post preskaŭ 20 jaroj, reliefigante tiel triumfon de la interhoma solidaro.

Dume la romano fariĝas literatūra evento. B. Apitz ricevas nacian premion kaj membriĝas al la arta akademio de GDR. Lia libro estas tradukita en 27 lingvojn. Ankaŭ en Esperanto ekparolas nun ĝiaj paĝoj antaŭ la internacia legantaro. La tradukinto estas K. Kunze, lingve konsultis J. Grumm. /k/

LA MUZEO DE MILITOPERACIO ĉe Ostrava, faldfolio eldonita okaze de la IIIa Esp. Kultura Festivalo 1974 en Opava. Esperantigis V. Kočvara.

Gazetara spegulo

"Lidová demokracie"/14.9./skribas pri la SET Lančov sub la titolo "Bratrstvo zelené hvězdy" • "Práce" resumas la intervjuon de la ĝen. sek. de la hungaraj sindikatoj al E. Magazin • "Mír a esperantisté" estas artikolo en MÍR, org. de Ĉs. Pac-komitato /n-ro 9/ • Pri la renkontiĝoj en Mělník skribas Nové Mělnicko /10.10/ • TVORBA /28.8./ sur 25 linioj citas leteron de sia leganto O.K. • Mladý filatelista publikigas artikolon je la temo Esperanto. Pri ties estonteco skribas "Rozvoj" /25.9./ en Semily.

Konkurso de ĈEA

Okaze de la 30-a datreveno de la liberigo de ĈSSR far la Soveta Armeo la CK ĈEA proklamas neanoniman konkurson en la TRADUKAJ POEZIOJ KAJ PROZO /rakontoj, noveloj, roman-fragmentoj, reportaĵoj ks./ konsiderante la ĉeĥan literaturon de post 1938/1945/. Konkursi rajtas ĉiuj membroj de ĈEA kaj de AE SSR. La kontribuoj devas esti laŭlingve altnivelaj kaj ĝis nun nepublikigitaj. Ilia amplekso ne estas limigite. Limdato por la konkursanoj : 28.2.1975./Adr.: ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1/. La manuskripton oni sendu en kvar kopioj kaj sur la koverton skribu KONKURSO.

PREMIOJ :	poezio	Ia	200 Kčs	prozo	Ia	350 Kčs
		IIa	150		IIa	250
		IIIa	100		IIIa	150

La konkursaĵojn prijuĝos ĵurio, kiun nomos la estraro de ĈEA.

Pasio dumviva

Profesoro D.L.Armand estas doktoro pri geografiaj sciencoj, aŭtoro de la libro "Por ni kaj por la nepoj", kiu ricevis la unuan premion en la tutsovetia konkurso de sciencpopulara literaturo. Li estas entuziasmo pri Esperanto, ties veterano kaj fakulo.

"Ĉiuj niaj pasioj originas en la infanaĝo", diras prof.Armand, kiu ekokupiĝis pri la internacia lingvo en 1922, en la 7a lerneja klaso, kie la fremdlingvojn instruis la fama esperantistino A.N.Ŝarapova. Ne estas forgesebla la alveno en la lernejon de l' iama lerninto de Ŝarapova, blinda esperantisto, poeto V.Eroŝenko. Persvadis la junan lernanton rakontoj pri vojaĝoj eksterlanden kaj de tiam Esperanto kaj la vojaĝoj aŭ Esperanto kaj la geografio ne estis apartigeblaj.

Prof.Armand laboris dum ekspedicioj sur duoninsulo Kola, en Mezrusia Altaĵo, en Ukrainio kaj ankaŭ alilande. Kaj ĉie, paralele kun la scienca laboro, li serĉis kontakton kun esperantistoj. Antaŭ multaj jaroj, traveturante kun ekspedicio pli ol 35 mil kilometrojn tra la ĉinaj provincoj, li eksciis, ke la interpretisto, ĉino, parolas Esperanton. Tiu ĉi kontaktigis lin kun la esperantistoj en la ĉefurba Esp. asocio. Dum la renkontigoj kun redaktoroj, oficistoj, verkistoj Armand en la nova lumo ekkonadis la landon de la plej komplika lingvo en la mondo.

La Esperanto-veterano konatiĝis kun pluraj kolegoj-geografoj. Interŝanĝante librojn, artikolojn, li ricevadis multe da valoraj sciencaj informoj, precipe en Esperanto. Kaj pruntedonante la literaturon al siaj kolegoj li samtempe logis ilin por la Internacia Lingvo.

Tiu ĉi reciproka ligiteco ne estas hazarda - diras li. En la mondo aperas nun ĉ.100 mil titoloj da scienc teknikaj periodaĵoj. Oni publikigas proks. 3 milionojn da artikoloj po jare. Iuj usonaj kemiistoj opinias, ke pli facilus ellabori teknologion pri ellaboro de nova substanco ol serĉadi en literaturo, ĉu ĝi jam antaŭe ne estis inventita... Por venki la prilingvajn barojn ĉe ni kaj eksterlande oni elspezas kolosajn rimedojn.

Kaj ĉu ne estas paradokso, ke kun la evoluanta sistemo de instruado, kun la pliiĝanta aperigado de vortaroj kaj poliglotaĵoj, komplikiĝas la vojoj por likvidi la nekomprenadon. Esperantistoj el la plej foraj anguloj de la terglobo tiajn komplikaĵojn ne konas...

/laŭ J.Gold en "Sovetskaja molodeĵ", Riga, esperantigis T.Arbergs/

J. NESVADBA INTER NI

Esperanto estas laŭvice la 14-a lingvo, helpe de kiu disvastiĝas miaj libroj eksterlande, diris ĉe ĉi verkisto Josef Nesvadba vizitante la sidejon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio /1.10./ Inter tiuj ĉi estas ankaŭ la malpli disvastiĝintaj kiel ekz. la latva kaj estona. En E-o aperis nun dek scienc-fikciaj noveloj kun kontraŭmilita temaro de tiu ĉi konata aŭtoro, profesia psikiatro.

Esperanto jam pli frue rolis en la verkista kariero de J.Nesvadba: antaŭ dek jaroj okazis en Auckland, Usono, verkista kongreso kun aparta sesio de "sci-fi" - amantoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ adeptoj de la Internacia lingvo.

J.Nesvadba montris intereson pri Esperanto kaj li kun scivolo sekvos akcepton de sia verko en la Esperanta merkato. /kni/

EN KAFEJO ESPERANTO, Frýdek Místek prelegis la 20an de okt. pri H.Ch. Andersen E.Windeballe, instruisto el Odense, la naskiĝloko de la fama infanverkisto. La prelegon, kiu estis akompanata per lumbildoj, oni tradukis en la ĉeĥan.

LA ĈISOMERAN TRADICIAN FERIADON en la ripozdomo de Jitex sur la montpinto Churáňov ĝuis krom lalokaj klubanoj el Písek ankaŭ tri esperantistoj el GDR. La programon aranĝis J.Svojše el Prachatic.

M l a d í p ř á t e l é,

setkávat se dnes s rubrikou, která vás bude pravidelně informovat o všem, co se vás týká, formou různých zpráv, článků, fejetonů apod. Chceme vytvořit pestré zpravodajství jako je pestrý sám život mladého člověka dnešní doby. Rádi uveřejníme vaše příspěvky a zajímavosti a věříme, že se budete obracet na Starto s důvěrou.

SEMINÁŘE esp.mládeže ČSR mají již svou tradici. Po deváté již se sešli v září tr. v Polesí u Rynoltic mladí esperantisté z několika míst, aby společně strávili dva dny. Hlavním cílem tohoto semináře bylo podat neesperantským účastníkům základní informace o esperantu a esperantistům pomoci zlepšit jejich konverzační znalosti. V průběhu semináře zasedala také komise pro činnost mládeže. Program setkání zpestřilo vystoupení E.Seemannové, táborák, turistická vycházka a společná zábava.

Myšlenka, která všechny spojovala a vytvořila brzy dobrou partu, pomáhala snášet některé organizační potíže. Zážitků bylo hodně, a ti, kteří o ně přišli, mají smůlu. Mohou si to však vynahradiť na dalším setkání.

VII.SETKÁNÍ ESPERANTISTŮ /Mělník, 19.-20.10.74/ mělo pro mladou esperantskou generaci u nás velký význam. Na pracovní poradě členů Komise pro činnost mládeže se zástupci místních skupin ČES byli zástupci informováni o poslání komise, které má zajišťovat jednotnou činnost mladých esperantistů ve všech místních skupinách svazu. Přítomni byli vyzvání, aby ve spolupráci se SSM zakládali ve svém okolí Interkluby SSM, které jsou jedinou zárukou masového rozšíření mezinárodního jazyka mezi mládeží. Ing.J. Hoffmann, tajemník OV SSM v Aši, který již delší dobu pracuje v tamním Interklubu, informoval o konkrétních formách činnosti Interklubu.

Máte-li zájem o tuto formu činnosti SSM, která zároveň pomáhá

rozšiřovat esperanto, obraťte se na ing.Jiřího Hofmana, Mikulášská 10, Aš, okr.Cheb.

ZO SSM V ZÁVODĚ ČKD Kompresory v Praze uspořádala kurs esperanta pro mladé pracovníky závodu. Kursu se účastní 30 začátečníků, kteří během školního roku dosáhnou základních znalostí o mezinárodním jazyku.


KOMISE PRO ČINNOST MLÁDEŽE hledá nové spolupracovníky. Chce navázat styk zejména s těmi místními skupinami, které se nezúčastnily mělnické porady. Pište na adresu: Josef Vítek, U trati 120, 252 24 Zličín, Praha 5.

MLADÍ ESPERANTŠTÍ PEDAGOGOVÉ, absolventi kursu D, kteří chtějí pomoci při výuce v Interklubech SSM, ať piší na adr. Vladimír Škoda, Vaníčkova 36, 600 00 Brno-Židenice.

**Korespondenci
deziras**

V.CHIZHOV 23j., ul.Sestroreskaja 8-9, Leningrad 197183, USSR • Anu SOLDAN, NSVL Eesti N 3 V, Tallinn Väära 22-1, 200 016, Estona SSR • Eva WOLF, 17j., 99 Plauen, Hartmanstr.12, GDR • Eva BALOGH 4030, Debrecen, Balogh M.u.14 kaj F. SZILVÁSI, 4320 Nagykalló, Táncsics ut. 22, ambau Hungario. • Takahashi YOSHITERU, 6-15, Sakashitacho, Isogo-ku, Yokohama 235, Japanio • f-ino S.ČERNÍKOVÁ, Věclavkova 774 /28 293 01 Mladá Boleslav, ČSSR.





La jarkonferenco de Fervojista sekcio realiĝis dum la 7a kaj 8a de sept. en Poděbrady. Malfermante ĝin J. Pištora, la sekcia prezidanto, bonvenigis la gekolegojn, la prezidanton kaj la sekretarion de ĈEA J. Vitek kaj Z. Křimský k eksterlandajn gastojn. Salutis plue s-ro Scharf el Aŭstrio.

Interesan prelegon pri fervojtrafiko kaj rekonstruo de fervojnodo en Prago prezentis longjara kaj oferema k-go inĝ. J. Řebíček. La prezidanto de FS en sia parolado taksis laboron de la estraro, komitato kaj anaro dum la lasta laborperiodo. Li laŭdis la terminaran komisionon pro la preciza laboro, la rondetanojn en Ĉ. Třebová kaj la lokan EK-komitaton, sed akre kritikis la ekskursan komisionon, kiu ne realigis eĉ unu ekskurson dum la lastaj jaroj.

Li koncize tuŝis ankaŭ la ĉefproblemojn pritraktitajn dum la XXVI-a IFEF-Kongreso en Tarragona kaj parolis pri la partopreno en la solena kunveno de la hungaraj fervojistoj-esperantistoj enkadre de la Fervojista Tago en Hungario. Plue li akcentis la neceson kunlabori kun ĈEA, sen kiu la sekcio ne povus ekzisti.

Poste oni voĉdonis pri la nova FS-komitato. Kiel prezidanto estis

ŜUKCESA ĴARKONFERENCO de la sekcio

elektita inĝ. Emil Jindřich el Ĉ. Třebová, postenon de la vicprezidanto akceptis J. Pištora, la ĝisnuna prezidanto, redaktoro fariĝis F. Jindra kaj la nova ĉestro de la komisiono por eksterlandaj ekskursoj iĝis L. Láni el Plzeň.

En la dua parto de la kunveno parolis sekr. de ĈEA Z. Křimský pri aktualaj problemoj de la asocio kaj pri ties kunlaboro kun FS. Post vigla diskuto estis prezentitaj laborplano kaj financa plano por 1975.

La amuzan vesperon bonege preparis organizanto de la jarkonferenco, L. Fiala el Poděbrady.

Dimanĉe la 8an de sept. la konferencanoj forveturis per ekskurso - ŝipo al la ripozloko Oseček, kie la programo kaj medio kontentigis ĉiujn. Tagmeze la konferenco finiĝis kun la deziro : VIVU LA LINGVO DE LA PACO - ESPERANTO !

/JaPa/

ALIĜEBLECO POR WILLACH

Laŭ interkonsento kun LKK en Willach /Aŭstrio/, urbo de la venontjara IFEF-kongreso, FS atentigas seriozajn geinteresitojn el inter aktivaj membroj de FS ĈEA pri la ebleco partopreni - kun jenaj kondiĉoj :

- oni mendu aliĝilon ĉe J. Pištora, Nám. míru 1746, 560 02 Ĉ. Třebová,
- ĉiu interesito plenigu ĝin precize kaj forsendu ĝis 31.12.1974 al k-go Pištora, kiu ekspedos ĉiujn al Aŭstrio,
- se vi ne ricevos ĝis la 31-a de dec. alian informon, postulu ĝustatempe valutpromeson ĉe la Ŝtata banko,
- ricevinte ĝin tuj informu k-gon Pištora, kiu sume sciigos la organizanton pri la nombro de la alvenontoj.

Estas necese observi la supre menciitan procedon laŭ spertoj rilate la lastjaran kongreson en Tarragona; al kiu aliĝis ankaŭ 29 kolegoj el ĈSSR, sed duono el ili ne alveturinte forgesis nuligi siajn aliĝojn.

La sekcia komitato sciigas, ke komenciĝis traktado kun la turisma oficejo por viziti la kongreson en Willach karavane.

SKRIBU LETERON AŬ POŝTKARTON al Radio Budapeŝto/1800 Budapest, Bródy Sándor u. 5-7/, petante regulajn disaŭdigojn en Esperanto.

Ĉu Prago aŭ Praha ?

Sub tiu ĉi titolo aperis en la pasinta n-ro la artikolo de F.Sviták. Mi legis tiun artikolon jam antaŭ ĝia publikigo kaj atentigis la ĉefredaktoron, ke ĝi verŝajne elvokos polemikon. Li respektis tiun atentigon per la surskribo "Diskuto, opinioj". Do, mi kiel la unua leginto de la artikolo legigos ankaŭ kiel la unua kelkajn objektojn :

Praha ne estas bone prononcebla "preskaŭ por ĉiulingvanoj". Neniu franco kapablas elparoli "h". Rusoj kaj poloj ĝin legus tamen Praga, jugoslavo Praha.

Se Zamenhof estus opiniinta kiel k-do Sviták, li estus nominta Varsovion simple Varŝava, kion li tamen ne faris, same kiel li ne subskribis sin Samenhof, kiel lia patro, sed fonetike Zamenhof, kvankam tio estis certe granda persona ofero de la tradicio favore al la PRINCIPO de la 9a regulo de la Fundamento.

La plej multaj "defendantoj de Praha" en la ĉeĥa Esp.movado memoras la germanigantajn tempojn de la Aŭstri-Hungara monarkio, kiam oni kompreneble supozis, ke la nomo PRAGO ekestis pere de la germana traduko. Tamen la nomo estas derivita el la latina /Praga caput regni=Prago kapo de la reĝlando/ kaj vivis verŝajne ankaŭ en la praĉeĥa, kiel ĝi vivas ankoraŭ nun en la rusa.

En Esperanto ĝi estas ankrita per la Poŝatlaso de la mondo /far T. Pumpr kaj J.Kavka/.

La PIV de Waringhien enhavas ambaŭ formojn, tamen la unuan /Prago/ kiel uzindan, la duan /Praha/ nur kiel informan /=Prago/.

Felix

60-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, KOPENHAGO

La 60-a Universala Kongreso de E-o okazos inter la 26.7 kaj 2.8. 75 en Kopenhago. La preparlaboroj jam komenciĝis, fondiĝis la LKK sub la prezido de G.Kühlmann. Jen la unuaj informoj pri la 60-a UK :

K o n g r e s k o t i z o j /validas ĝis la 31a de dec.74/

Kongresano, ne membro individua de UEA	118 Gld.
Kongresano, individua membro de UEA kun JL	98
Kongresano, ind.membro de UEA kun JL kaj revuo	78
Edz/in/o de kongresano en kat.1	82,60
Edzino de kongresano en kat.2 aŭ 3	68,60
Junulo ĝis 20jara inkl.	35,40
Universitata studento ĝis 30jara inkl.	59
Blindulo	47,20

La kotizo inkluzivas la partoprenon en la kongresaj aranĝoj, sed ne loĝadon, ekskursojn, veturkostojn k.s.

František K m o c h :

KOLÍNE, KOLÍNE

/Kolín, vi urb' de ben' /

Kolín, vi urb' de ben', staras bele sur eben', mia amatin' kara en vinejo ĝufara min priservas tie mem.	Venis ĝin bela knab' flanke sidis lia ĉap', mendis li da vin' pindon, kantis li ĉe glas-tinto: "Kolín, ho vi urb' de ben'"
---	--


Esperantigis J.Kořínek

27.9.1974

KOLIK NÁS VLASTNĚ JE ?

/údaje z konce září 1974/

Byla vydána členská legitimace
s číslem 3 641
Zaplacené členské příspěvky má
pouze 2 208
Z toho v kategorii A 941
B 525
C 25
D+E 717



členů.

Zamyslíme-li se nad těmito čísly, je nutno přiznat, že nejsou povzbudivá. Proč a kde je chyba ? Proč nám ročně přibude a současně ubude téměř 600 členů ? Proč se absolutní stav tak pomalu zvedá ? Neslibujeme při náboru něco, co nemůžeme splnit ? Staráme se dost o využití jazykových znalostí, nenecháváme nové členy tak trochu svému osudu ? Jsou naše schůzky zajímavé ? Ptejte se po důvodech vedoucích svých klubů i sami sebe a napište nám !

SNÍŽILI JSME CENY NĚKTERÝCH KNIH ! Je to tím, že se nám podařila vhodná relace při výměně esperantských publikací v zahraničí. Proto od 1.10.1974 prodáváme se slevou tyto knížky :

1. Sklavoj de dio původně 62 Kčs nyní 50 Kčs
2. Ora duopo 34 17

DÁLE VÁM NABÍZÍME za sníženou cenu 1.ročník časopisu Juna Amiko z MLR. Zbytek rozebraného nákladu nabízíme se slevou 50% /původní předplatné činilo 15 Kčs/. To znamená celý ročník /3čísla/ za Kčs 7,50. Předplatné pro 2.ročník zůstává 15 Kčs.

STARŠÍ ROČNÍKY ČASOPISU P A C O /i když možná některé nekompletní / nabízíme rovněž za poloviční cenu, to znamená 15 Kčs za celý ročník, jinak 2,50 Kčs za jedno číslo. Žádáme zájemce, aby neotáleli s objednávkami.

SEZNAM KNIH DOPLŇUJEME o další novinku : je to humorná knížka z MLR : "Sercoj, rakontoj" za 5 Kčs.

NA SKLADĚ máme rovněž knížku z Jugoslávie "Ridu per Esperanto" za 18 Kčs a "Junulara kantareto" za 5 Kčs.

ZÁJEMCE O KNIHU "MINULOST BUDOUCNOSTI" prosíme, aby omluvili, že její vydání bude zpožděno. Autor nás upozornil, že vydání musí být ještě projednáno s některými politickými orgány. Jakmile se toto zdržení odstraní, budeme vás včas informovat.

STÁTNÍ PEDAGOGICKÉ NAKLADATELSTVÍ vydalo učebnici esperanta pro pokročilé od J.Cinka v nákladu 10 000 ks. Při grafické úpravě byla nedopatřením vytištěna esperantská hvězda v modré barvě. Nakladatelství se proto omlouvá všem uživatelům této učebnice. My dodáváme : hlavně, že vyšla. Žádejte ji ve všech knižních prodejnách.

ODZNAK ČS.ESPERANTISTŮ JE HOTOV ! Zájemci z Čech i Moravy jej obdrží v našem sekretariátě za 7 Kčs. Neváhejte s objednávkou !! Odznak je vkusný - a v omezeném množství. Jeho autorem je D.Bar-tošík z Prahy.

DOPISNÍ PAPIŘY A OBÁLKY s esp. tiskem jsou již téměř vyprodány. Prosíme vás, abyste je nepožadovali výměnou za SKP,nebudou skladem.

P O K U S P R O 1 5 0 0 ! ! !

V minulém čísle jsme udělali "pokus" pro 1 500 vybraných předplatitelů Starta a poslali jsme jim zbývající SKP. Děkujeme všem, kteří plně pochopili, oč svazu jde. Jste výbornými spoluautory. Vaše dopisy jsou vesměs povzbudivé a milé.

Ty, kteří ještě neměli dost času odeslat platbu za SKP anebo vrátit poukázku, aby tak neprodleně učinili. Jsou ještě další zájemci o SKP, ale poukázky nám chybí. Stejně tak prosíme vedoucí EK, aby brzy vrátili SKP do sekretariátu, pokud nemají možnost je prodat.

HLEDÁME ZÁJEMCE O VEDENÍ PÍSEMNÝCH KURSŮ ESPERANTA

ČES vydá podle plánu na příští rok jednotný písemný kurs esperanta, rovněž bude tuto akci propagovat ve sdělovacích prostředcích. Učitelé budou v zaměstnaneckém poměru k ČES.

P o d m í n k o u p ř i j e t í z a u č i t e l e :

- a/ perfektní znalost jazyka /doklad o zkoušce nebo o úspěšně zakončeném kursu D v Lančově/
- b/ členství v ČES
- c/ praxe ve vyučování e-a, nejméně 5 let
- d/ souhlas zaměstnavatele s vedlejším pracovním poměrem /písemný/

Pedagogická činnost v občanském životě vítána. Předběžné přihlášky zasílejte na adresu ČES.

ČÁST ČLENSKÝCH PŘÍSPĚVKŮ NA ROK 1975, pokud budou zaplacený do konce tr., zůstanou ve prospěch klubů. Získané prostředky lze použít k zlepšení finanční situace, na nákup knih, předplatné apod. Tato výjimka platí pouze do konce roku 1974. Později odevzdané příspěvky budou poukázány svazu v plné výši. Jenom na vás záleží, zda pomůžete svému klubu !

V POSLEDNÍCH INFORMACÍCH JSME VYPSALI SOUTĚŽ mezi kroužky k získání dalších předplatitelů čas. P A C O. Kromě cen získá svaz i část předplatného. Informujte se u vedoucích svých kroužků !

DOBROVOLNÉ DARY : J.Pařízek, řed. školy v Prostějově, 200 Kčs a A. Horák, Brno, 12 Kčs.

O p r a v a : EK při OKS K.Vary má tuto koresp.adresu: J.Klement, kpt. Nálepky 7, 360 04 K.Vary.

NAŠE KRONIKA. Ve věku 86 let zemřel 9.10 Antonín T o b i á š e k, z Hradce Králové. Z našich řad odešel také Josef M a z á n e k, dne 12.října v Ostravě. Čest jejich památce !

S T A R T O - eldohas ČEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro O.Kníchal. Red.rondo : inĝ.E. Felix, inĝ. F.Sviták, J.Mařík. - Dohlédací pošta Praha 07, sníž.pošt. poplatek povolen povolen ŘP Praha j.z. P/1-2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 1.listopadu 1974. ST - 17 - 6833/74

